

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto : vers une culture
sociale sans frontières.*



Ĉu eblas plibonigi La Sagon dank' al la demandaro de l' referendum?

Se ĉijare ni ricevis (proporcie) iom pli da respondoj ol antaŭe, la nombro restas tro modesta, por difini kun certeco, kia estu la revuo. Nepre oni trovu sistemon por ke reagoj/kritikoj pli nombras kaj pli oftas.

Oni facile imagas ke la ĉi-suba bildigita metodo ne estas la plej efika por efektiviigi tiun celon....



Rubrikon «b» vi trovas
taŭga kaj interesa. Ĉu jes?

Jes, ja...
tutcerte...

Tutcerte volas vi pliboniĝon
de La Sago, ĉu ne?
Respondu!

Jes, ja...
tutcerte...

Kaj rubrikon «f» tute
superflua. Ĉu tia?

Mi ĵus estis
tion dironta!...

Bone.
Subskribu!



Nu, en epoko kiam oni hezitas preni folion kaj skribilon kaj koverton kaj poŝtmarkon, kaj foje eĉ aŭtomobilon por poŝti simplan rimarkon, dum per rapida fingrumado sur komputila klavaro ebligas en nur du minutoj sendi la samon ĝis la fino de l' mondo, ni tutsimple mistrafis tiun simplan rimedon por ebligi pli oftajn reagojn.

Ja oni povis komuniki kun la redakta skipo uzante <lasago@free.fr> kiel indikate p.3, sed oni povas kompreni ke ĝi nur uziĝas por sendi kontribuojn. Do ekde nun ni pli klare indikos, ke ĉiuj rimarkoj, kritikoj pri la revuo - ĉu pozitivaj, ĉu negativaj (kondiĉe ke ili estu ĝentilaj) - estas bonvenaj je tiu ret-adreso.

La Redakcio

La Florbukedoj de Marcelo



Sanguisorbe officinale

Le nom latin de cette plante riche en tanin compile les mots *sanguis* sang et *sorbere* absorber. leurs racines sont utilisées pour les flux trop abondants des menstrues, et les tiges et feuilles dans les bandages sur blessures. Le rouge couleur sang est le signe attestant son efficacité. Elle nécessite un sol sec pour croître.

P*



Callune fausse bruyère

Les surfaces couvertes de callunes ne sont propices aux arbres que difficilement ou tardivement, parce que les racines de callunes libèrent dans le sol des substances qui inhibent la formation de champignons et freine en même temps le développement des arbres vivant en symbiose avec eux. Par la collecte du nectar de callunes, les abeilles préparent le miel de bruyère. Effectivement parente de la bruyère, les feuilles distinguent les deux plantes. Des branches, on faisait des balais.

Laŭ anekdoto sendita de Stefan' B.

Dankon Stefan'! Sendu plu!

Testudo

pseŭdosciencia
Bilda Delirajo
far Sir'
\$08

Doktoro, ĉi -nokte, dum la tuta nokto, mi sonĝis* esti besto ...Ĉu gravas?

Tute ne! Ofte oni sonĝas esti besto. Kiu besto estis vi?

Mi sonĝis esti ĉevalo...

Bone, kaj kion faris vi, ĉevalo*?

Mi paŝtiĝis...*

paŝtiĝis...

kaj paŝtiĝis...

.. la tutan nokton* paŝtiĝadis....

Nu, ĉu tio estas problemo?!?

Matene*, mi ne plu havis matracon!



K*

*Testudo = tortue / Test-studo = étude par tests.
*Sonĝi = rêver (en dormant) ≠ Revi (rêver = esperer)
*ĉevalo = "étant cheval"

*paŝtiĝi = paître (paŝti =faire paître)
**"la tutan nokton" et "matene" deux formes de complément de temps direct (sans preposition): accusatif et adverbe.